

& La aglo kaj la vulpo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 377 paŝoj dum 5 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (Ezopa Saĝo, 1956). Baladigis Martin Strid (2015) per feroaj melodio kaj rekantaĵo tradukita de Leiva balado (Leivur Øssursson), disduiginte la versojn.>

(#Melodio:

<:29> (a;mi /mimi mimi redo do;La dore mimi mimi; miidodo dore redo do;La dore mimi mimi;

(#Rekantaĵe: redo do dore mi; mire dore mimi; mimi mimi; redo doLa do mi La)

)×13)+

(&Strofoj:

'1 La /aglo foje kun la vulp' ; federis sin amike, ; kaj por ke ĉi amika lig' ; firmiĝu pli fortike,

(×: **Paŝu firme sur plank'**, ; **ŝuojn trivu ankaŭ**, ; **regu dio**, ; **kie dancos ni sen mank'**.)

'2 ili loĝiĝis en proksim': ; La aglo neston plektis ; sur alta arbo, dum la vulp' ; arbuston por si elektis

'3 sub tiu sama arbo kaj ; la idojn tie kaŝis. ; Sed foje, kiam el la hejm' ; al kampo ĝi forpaŝis,

'4 la aglo, manke de manĝaĵ', ; alflugis, rabe prenis ; la vulpidetojn, kaj kun la ; aglidoj manĝfestenis.

'5 La vulpo post la hejmenven' ; sciiĝis pri l' perfido, ; la aglon malbenegis, sed ; ĉi tiu kun mokrido

'6 respondis per orgojla kri': ; "Al mia alta nesto ; neniam via kolereg' ; atingos, rampa besto!"

'7 La vulp' lamentis: "Mankas,ve, ; flugpovo, kaj mi sen ĝi ; ne estas ja kapabla la ; flugantan birdon venĝi.

'8 Nenio por mi restas krom, ; en mia kolerbrulo, ; malbeni, kiel faras al ; potenca perfortulo

'9 senhelpaj kaj malfortaj, kaj ; toleri pacience." ; La aglon tamen trafis pun' ; pro tio, ke atence

'10 la ligon de la amikec' ; ekrompis ĝi, perfida. ; Altaro staris kampe, kaj ; la oferaĵ' kaprida

'11 jam brulis, kiam el la alt' ; la aglo sin aljetis, ; ĝin kaptis, portis al la nest'. ; Sed vento ekimpetis,

'12 la nesto per ardaĵa karn' ; ekflamis, brulis, falis ; kun la aglidoj. Kuris tuj ; la vulpo, sin regalis,

'13 manĝante ilin antaŭ la ; okuloj de la aglo. ; La justo tiel venkis per ; hazardo aŭ miraklo.)